

ĉi tiun simbolon, en la statuon mem“, tiam diris Richard Hašek, la nepo de la ĉeĥa verkisto.

La aŭtoro de la statuo estas František Svátek, kiu rompis sian tradicion. "Mi kutime ne kreas monumentojn aŭ partoprenas konkursojn, sed mi vere antaŭĝojis pri ĉi tio," li konfesis. De la unua momento estas klare, ke lia statuo estos la plej granda loka turisma allogaĵo. La antaŭa fiero de la vilaĝo, kiu estas la loka ponto kaj la ĝendarmeria stacidomo, restos en ĝia ombro.

El la interreto tradukis L.S.



Monumento de Jaroslav Hašek (aŭtoro de la libro Brava soldato Švejk) estas en Lipnice,

ĈEA finance kontribuis al ĉi tiu monumento.

Bildeton de Švejk pentris J. Lada.



La ŝako kiel saniga terapio

Bonfarto respondecas pri la tuta ekvilibro de nia vivo. Ĝi respondecas tiel pri la fizika forto, kiel pri la menso de la individuoj.

Celante kvietigi kaj malstreĉigi, kelkaj psikologoj indikas ŝakludon al siaj maltrankvilaj pacientoj.

Laŭ ili, ŝakludo helpas la kuracadon de deprimo kaj menslaceco, ĉar ĝi stimulas la rezonkapablon de la paciento, regalante lin per trankvileco, ĉar ĉiu movo en la ludo portas silenton al la menso. Alia rilato al la sano estas, ke ĉe 99 % de homoj, kiuj praktikas ŝakon, ne disvolviĝas malsanoj kiel *Alzheimer* kaj *Parkinson*, kaj aliaj grandaj suferoj.

Nuntempe estas ankaŭ speciala ŝakterapio direktita al tiuj, kiuj ne kapablas sukcesi en lernejo.

Kelkaj klinikoj uzas muzikterapion kune kun la ŝako, por flegi la malsanulojn. Dum la ŝakludo oni aŭdigas muzikojn klasikajn kaj modernajn, instrumentajn aŭ kantatajn. Tio igas ankoraŭ pli malstreĉiga la etoson. La rezultoj estas surprizaj!

Infanoj aŭ adoleskantoj agresemaj kaj nervozaj pli bone fartas dum tiaspeca flegado, kaj estas same tiel ankaŭ lernantoj, kiuj havas malfacilon fari amikojn, malfacilon koncentri pri io, ne sufiĉan lernprofiton kaj apation.

Ni bezonas bone zorgi nian fizikan sanon, sed neniam forgesu nian mensan bonfarton, ĉar estas ĝi, kiu subtenas la sanplenan vivon. Sana menso igas sana la korpon!

Ŝakmato!



Verkis : Liette Lêla
Reviziis: Célio Freitas Martins

VÁNOCE

Hlas zvonů táhne nad závějí,
kdes v dálce tiše zaniká;
dnes všechny struny v srdci znějí,
neb mladost se jich dotýká.

Jak strom jen pohne haluzemi,
hned strásá ledné křišťály,
rampouchy ze střech visí k zemi
jak varhan velké pišťaly.

Zem jak by liliemi zkvětla,
kam sníh pad', tam se zachytil
Bůh úsměv v tvářích, v oknech světlo,
a v nebi hvězdy rozsvítil.

A staré písně v duši znějí
a s nimi jsou sny jesliček
kol hlavy mé, jak ve závějí
hlas traticích se rolniček.

Můj duch zas tone v blaha moři,
vzdech srdcem táhne hluboce,
a zvony znějí, světla hoří -
Ó Vánoce! Ó vánoce!

Autoro: Jaroslav Vrchlický (1853–1912)
Esperantigis: prof. Jaroslav Mráz (1933-2005),
Rokycany, Ĉeĥa respubliko



Jaroslav Vrchlický
poeto

LA KRISTNASKO

Sonoro ŝvebas super neĝoj,
finsonas ĝi en malproksim';
la koro sonas per arpeĝoj,
ĉar la juneco tuŝas ĝin.

Se siajn branĉojn movas arboj,
glacikristaloj falas jen,
de l' domoj pendas glacigarboj
kiel fajfiloj de orgen'.

Ekfloris sur la ter' lilio,
kie ekkuŝis neĝa hel';
fenestrojn eklumigis Dio,
vangojn kaj stelojn en ĉiel'.

Enmense kvazaŭ kanto sonus,
kun ĝi pri kripoj revoj mil
ĉirkaŭ la kapo, kvazaŭ dronus
en neĝoj voĉo de tintil'.

Denove mia mens' jubilas,
kaj ĵemo iras tra la kor',
sonoroj sonas, lumoj brilas -
Kristnaska hor'! Kristnaska hor'!



prof. Jaroslav Mráz
tradukisto